# Historio de AEA en Heleco

Fine de aŭgusto ĉi jare estis eldonita la 84a numero de la revuo Heleco, presorgano de nia **Astura Esperanta Asocio**. Tial ke ĉi tiu jaro estas la Centjara Jubileo de ĉi tiu Asocio, la menciita numero de la revuo estis speciale dediĉita al la jarcenta historio de la esperantista movado en Gijón konkrete kaj en Asturio ĝenerale. Krome estis speciala ankaŭ la grando de la revuo; ĉi tiu numero havis 100 paĝojn!

Kompreneble, tiel ampleksa tempo-periodo generis multe da informa materialo, sed ties distribuo ne estis reguleca, konstanta, ekvilibra, t.e. ni disponis de multe da informo el la lastaj epokoj de tiu historio, sed ne tiel pri la komenca etapo de la **Astura Esperanta Asocio** fondita kaj gvidita de Francisco Menéndez Rúa, t.e. de la epoko inter 1909 kaj 1936, kaj ankaŭ pri la jaroj de la hispana civil-milito.




La ĉefa informo-fonto de tiuj jaroj por nia laboro estis la verko de Antonio Marco Botella, Analoj de la esperanta movado en Hispanujo, kaj ankaŭ la gazeto-kolekto de **La Suno Hispana**. Verdire, la materialo pri Asturio en tiuj inform-medioj ne abundas. Do, nia historia raporto lamas pri tiuj epokoj.

Laŭ nia kutimo, la revuo estas prezentata en la retpaĝo de nia E-Asocio, kiu povas esti vizitata de ĉiu ajn Interret-uzanto. Konkrete, tiu numero de Heleco estas videbla en la adreso:
http://carleos.epv.uniovi.es/~faustino/heleco/84/h84.html

Unu el niaj legantoj, samideano Juan Azcuénaga, komunikis al ni ke en la presaro de nia regiono de tiuj jaroj estas mencioj, notoj, artikoloj kaj cetera informado pri Esperanto kaj pri **Astura Esperanta Asocio**. Tiu materialo estas serĉebla kaj videbla en Interreto, konkrete en ret-paĝo:
**http://hemeroteca.gijon.es/Default.aspx**

Ni povis konstati ke, jes ja, en tiu interreta gazetoteko estas kolektoj de asturaj ĵurnaloj de ***Avance, El Comercio, El Noroeste, El Principado, La Prensa, Voluntad*** k.a. de tiuj jaroj antaŭ la hispana milito. Kaj en tiuj ĵurnalaj kolektoj estas troveblaj iuj interesaj informoj pri nia E-rondo kaj pri Francisco Menéndez Rúa. Ni estas traesplorante tiun materialon kaj eble en la sekva numero de la revuo ni povos publikigi pri tiu periodo iun raporton kiu estos kvazaŭ aldono aŭ suplemento al la historia raporto de la 84a numero de Heleco.

Esceptante tiun mankon, pri kiu ni faras memkritikon, la cetero el la raporto estas sufiĉe kompleta prezentado de la vivo kaj la agado de la organizitaj geesperantistoj en nia urbo kaj en aliaj lokoj en Asturio. Pri tiu afero estas sufiĉe da informo en la arkivo de nia Asocio, kaj krome kelkaj samideanoj de nia urbo metis je nia dispono siajn fotokolektojn por la ilustrado de la historio. Krom korespondado de la iama **Esperantista Grupo Jovellanos** kaj akt-libro de tiu E-rondo kaj poste ankaŭ tiu de la nuna **Astura Esperanta Asocio**. estas ankaŭ la kolekto de la revuo Heleco, kiu raportas pri ĉio koncerne al ambaŭ E-organizaĵoj ekde la jaro 1976. Troviĝas en nia arkivo ankaŭ kolekto da eltranĉaĵoj el ĵur-naloj de nia urbo kaj aliaj lokoj, kiuj pritemas aferojn en rilato kun Esperanto, ties kongresoj, kursoj en Gijon…

Kvankam la ĉefa temo de tiu numero de la revuo estis tiu historio de **AEA**, tamen estis ankaŭ pritraktado de aliaj temoj, inter ili la ĉi jaraj kongresoj de Esperanto, tiel tiu landa en Malago kiel la universala en Bjalistoko, kaj aliaj informoj interesaj por la esperantistoj. Kaj ne mankis temoj de ĝenerala intereso, sen rilato kun Esperanto.